# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 14/03/2024 sescentsepdekoka eldono (unua eldono 26/09/2011)**

## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://globalsouth.co/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Esperanta Retradio



DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

Ne estas facîla elekti el al ĉiuj tagaj programoj     Do aŭskultu ĉiujn.

KAKAO ESTIS ŜATATA JAM ANTAŬ 5000 JAROJ 11 DE MARTO 2024 (*ROGER SPRINGER*)

## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato  Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno.     La 16a de marto estos la tria sabato.
Venu.     02 9976 6320     *Roger Springer*




Karaj,

Jen nova muzikalo de junuloj kun la kantisto Jonny M. Tre interesa teksto.

https://www.youtube.com/watch?v=C4SUrL_3C3M

Amike, *Nicole Else*



## Pli ol 46 de miaj grandaj fiŝoj mortis pro manko de oksigeno

Vidu AE677

46 tiom grandaj vivantaj fiŝoj kostas eble $16,000. Mortaj ili kostas nenion. *Roger Springer*

Kara Roger,

Mi memoras ke jam antau kelkaj jaroj iu mortigis viajn fiŝojn kaj ke vi povis reakiri kelkajn nur dank'al donacoj ĉar nun ne eblas importi tiujn fiŝojn. Certe tiu laboristo ne konscias pri la konsekvenco de sia ago kaj ankoraŭ foje tiu evento montras kiel dependaj de elektro ni ĉiuj estas.



Mi tute bone komprenas ke estas por vi ŝoko vidi la ventron de la fiŝoj al la ĉielo anstataŭ rapida, gracia movado al iu angulo de la baseno. *Franciska Toubale*

Saluton Roger

Kompaton pri via belaj orkarpoj, sed ne malesperu!

La ceteraj karpoj povas kreski tre tre rapide kaj plenigos la spacon haveblan.

Kaj ili bredos kaj produktos pli da idoj. La patrinaj karpoj bezonas densan herbon por demeti kaj kovi la ovojn, alie la ovoj mortos.

Atendu kaj vi vidos! Bonajn Dezirojn de *Jennifer Birchall*

Manly Observer

FREE. FRANK. FAIR

(WITH SOME QUIRKY FLAIR)

REGULAR NEWS FEEDINGS VIA SOCIAL + ONLINE. BY LOCALS FOR LOCALS

La morto de 46 grandaj fiŝoj de Roger

[Sad loss for Manly identity after pond mishap - Manly Observer]

(en la angla, belaj bildoj) *Roger Springer*

A Current Affair Season 2024

9NOW

*Roger Springer io pli sed malsama*

https://www.9now.com.au/a-current-affair/season-2024/episode-55 ekde 14.40minutoj



**3ZZZ** Kvankam Laszlo faras sian eblon por kontribui kiel eble plej al la Esperanto programo en 3ZZZ, li ne povis ĉeesti la 11an de marto2024, do Heather preparis kaj prezentis la programon.

Ŝi elektis paroli pri la problemoj renkontitaj dum uzo de la modernaj poŝtelefonoj kaj pri arbaroj, ĉu kiel loko por edukado, ĉu kiel endanĝerita loko, kiun necesas savi. *Franciska Toubale*



Hodiaŭ floras mia orkideo " Sierra Belle" en mia ĝardeno

*Peter Danzer*



# El sudaŭstralio



La 7-an de marto la sudaŭstralianoj renkontiĝis zoom-e. Krom kelkaj klubaj aferoj estis prelego de Katja pri la fama surd-blindulino Helen Keller. Ilustra bildo: Helen Keller

## La marta ondo

En marto siajn jubileojn festas Gian Carlo Fighiera (95 jaroj), Petras Čeliauskas (95 jaroj) kaj John Wells (85 jaroj). Ne forgesu gratuli ilin kaj legu en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* la tutan liston de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por marto 2024, kiun kompilis Aleksander Korĵenkov: https://sezonoj.ru/2024/03/marto-11/

## Demonstra Ondo – ondo ne de-monstra

Aperis la demonstra versio de la decembra eldono de la trimonata bitgazeto *La Ondo de Esperanto*. La 46-paĝa demoversio (pdf) enhavas plurajn tekstojn kaj teksto-komencojn el la riĉenhava kaj ampleksa 144-paĝa 318-a numero de 'La Ondo', dissendita al la abonantoj antaŭ 45 tagoj. Legu la demoversion kaj decidu pri (re)abono por 2024: https://sezonoj.ru/2024/02/ondo-123/ *Katja Steele*



# AEA-estrarkunveno Ĵaŭdo, la 7-a de marto 2024

Ĉeestis: Jonathan Cooper, Heather Heldzingen, Joanne Johns, Sandor Horvath, Bradley McDonald, Caroline Turner, Paul Desailly, Pedro Danzer

## (1) Somerkursaro 2025

Propono de Esther: New College UNSW en Sidnejo
Propono de Jonathan: Sankta Sophia

Ni komparis tiuj du ejoj .... Sankta Sophia multe altigis siajn prezojn...
Ejo en Adelajdo? Ni tre ŝatus ke Trevor kaj Katja partoprenu.
Aliaj?

Ni daŭrigu la ŝercadon ....

## (3) Ejo en Melburno?

Ni daŭrigis la diskuton .....
Oni diskutis pri la vivebleco de la eventuala Esperanto-Domo en Melburno .... Multaj malfermitaj demandoj.
Ni atendu pli detalan proponon de la Melburnanoj.

## (4) Arkivoj

Kelkaj labortagoj en Sidnejo? Eble post pasko? 22-24 marto 2024
Plej amike,

*Sandor Horvath*

